

# LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE



*La esperantista Laboristo*

mensuel de la Fédération Espérantiste du Travail

## L'éditorial du Président

Avec le traité de Maastricht, les gouvernants européens promettaient la libre circulation des hommes. La voilà! Le Directeur, Schweitzer, de la firme Renault s'en fait le propagandiste enflammé. Après la fermeture de la fabrique Renault implantée en Belgique à Vilvorde il annonce un possible reclassement de salariés belges dans des usines françaises. Au revoir la famille. Bonjour le camping car et le "mobile home"

Déjà le président Jacques Chirac invitait les jeunes à quitter leur pays pour chercher fortune ou tout au moins un emploi.

Le modèle américain, avec ses grandes migrations de travailleurs abandonnant leurs villes et une partie de leur famille pour quêter un travail dans un autre Etat au gré des intérêts des multinationales est mis à l'ordre du jour en

Europe. L'instauration de la monnaie unique d'ailleurs à cause d'ajustements économiques pèserait en particulier sur les salariés et les mettrait en concurrence d'un pays à l'autre.

En réaction à la fermeture de l'usine en Belgique les travailleurs belges, français espagnols organisent de fortes manifestations. Exemples sont ces luttes transnationales. Les travailleurs ne tolèrent pas d'être manipulés au profit d'une minorité de fortunés. Les bourses n'ont jamais été aussi "prospères".

Sans considérer, bien sûr, comme solution à l'exploitation des travailleurs et d'une masse de gens en Europe et dans le monde entier, l'utilisation progressive de l'Esperanto faciliterait les contacts entre les exploités. Bien que cette proposition existe depuis longtemps elle a toujours sa valeur.

Robert Laudereau

## Sommaire

Maastricht : dangero por la demokratio	p. 2	Paĝo por la komencantoj	p. 9
El nuntempa Francio	p. 3	Ĉu vere ciumi ?	p.10
La kancero de l'betono	p. 4	Enmigradon kaj leĝprojekto Debré	p.11
Misuzo de « promocii »	p. 5	Alvoko de Esperantistoj	p.12
Perfidita socialismo	p. 6	Esperanto ĉe televido	p.13
Aŭstrio, ĝia aktuala situacio	p. 7	Insule	p.14
La kvinpetalo	p. 8	Ĝ.K. de FET	p.15

**Le Travailleur  
Espérantiste  
La Esperantista  
Laboristo**

Journal créé en 1912

N° 223

Nouvelle série

Mars 1997

Directeur

G. Réquigny

Organe de la

Fédération Espérantiste du Travail

115 rue Béranger

F-92320 Chatillon

CCP 902-52 F Paris

☎ & Fax 01 46 42 64 79

Rédaction

Gérard Réquigny

33 rue de Lorraine

F-93200 Saint-Denis

Le numéro: 10 F.

Abonnements

normal: 100 F.

soutien: 170 F.

étranger: 110 F.

en France:

FET, 115 rue Béranger

F-92320 Chatillon

en Espagne

Luis Serrano Pérez

Font Nova 32

E-08202 Sabadell

Adhésion à la F.E.T.

normale: 50 F.

soutien: 140 F.

CPPAP: 57367

ISSN : 0339-5421

Polycopié par nos soins

*Les articles publiés dans "Le*

*Travailleur Espérantiste" reflètent le*

*point de vue de leurs auteurs.*

*Ils n'expriment pas nécessairement les vues*

*de la Fédération Espérantiste du*

*Travail.*

*Tout article peut être reproduit en*

*indiquant la source.*

## Maastricht : dangero por la demokratio

« La traktato de Maastricht malkaŝis evidenton, nome tion, ke la ununura objektivo estis la absoluta regno de la merkato, sen iu ajn malordigo el la opa decido, sed kun simplaj alĝustoj fare de « sendependaj » teknikaj organizaĵoj, gvidataj de duobla kaj ekskluziva nepra neceso : antaŭŝirmi la kurzon de la mono, kaj batali kontraŭ la inflacio ».

« Ne tre gravas se la amasa translokado de la geedzaj enspezoj al la entreprenoj (10 poentoj ekde 1982) kuniris kun seninterrompa kreskado de la senlaboro, morda demento kontraŭ la mekanista teoremo malkaŝe deklarata ekde 20 jaroj, laŭ kiu la hodiaŭaj profitoj estas la morgaŭaj investoj kaj la post morgaŭaj laborpostenoj (...) »

« ... Oni vidas, ke la eŭropa konstruado hodiaŭ estas samtempe la instrumento kaj la genia alibio de liberala ideologio, kiu, por la unua fojo, estas realigonta la « revon » de giganta merkato kaj de perfekta flueco sur teritorio regota de neniuj strukturita povo (...) »

« ... Kiam la traktato de Maastricht estis prezentita al referendumo en niaj landoj, la sinceraj Eŭropanoj, rifuzante konsideri vere grava la tekston mem, vidis en ĝi nur plian paŝon sur la vojo de la Unio kaj naive opiniis, ke la debato restis malferma pri ties naturo. »

« La kunveno de Dublin (sept 1996, NDLR), havas la meriton forigi ĉian iluzion. De nur klare aperas, ke hodiaŭ estas ja minacata la demokrata estonto de niaj socioj ... »

« Necesas eliri el la logiko de Maastricht. Necesas remeti la ekonomion en la centron de l'demokrata debato. »

Bruno Despresle,  
membro de l' « Cercle Condorcet » de Parizo.  
El « Les idées en mouvement »,  
monata organo de la Ligo pri Instruado

### Pri kelkaj tajperaroj

En la TE n° 222

paĝo 2: « kiel nomi tion, se ne klasbatalo? » oni legu « klasbatalo » (tio ne havas la saman signifon)

paĝo 4: « kaj aparte la rifuzon de la kapitalo de la ununura mono ». Oni legu « kaptilo ».

paĝo 4 « La afero de la senrajtiguloj faris grandan bonon ». Oni legu « bruon ».

En la TE n° 217

paĝo 4: « Tiri kuniklon estas certe malfacile, eĉ per la vorto ». Oni legu « vosto »...

# El nuntempa Francio

William Gilbert

## 0 - 6% = ?

Nos impôts sur le revenu vont diminuer de 6% cette année.

Mais ce « cadeau », qui représente 25 milliards pour la première année, vient à la suite d'augmentations (TVA, carburants, prélèvements sur l'épargne, impôts locaux) qui, depuis 1995, atteignent 120 Md de francs.

Mais la moitié des salariés sont déjà exonérés en raison de leurs faibles ressources.  $0 - 6\% = 0$ . De quelle diminution vont-ils profiter ? Une fois de plus, les plus démunis sont les dindons de la farce. Difficile de croire que le gouvernement n'y ait pas pensé ...

Mais il se vante d'avoir pu opérer cette réduction de l'impôt sur le revenu grâce à la compression des dépenses publiques. C'est dans ces conditions, paraît-il, que « notre économie se renforce et crée des emplois (!) ». « L'Etat n'est pas là pour dépenser sans limite ni contrôler l'argent des contribuables » selon M. Chirac. Belles paroles pour influencer le manant. Qui peut encore s'y laisser prendre ?

Mais derrière cette baisse se cachent des calculs bien précis. En effet l'impôt sur le revenu, qu'il est toujours désagréable de payer, est en fait assez juste car il est progressif, ce que ne permet pas l'impôt indirect. Or selon M. J. Arthuis, ministre de l'économie, la TVA deviendra « l'impôt de l'avenir dans une économie mondialisée ». Ce qui induit une réduction drastique des dépenses publiques. Privatisations et impôts marchent ainsi de pair. Mais il faut savoir que, d'après une étude du syndicat national unifié des impôts (SNUI), un smicard voit son revenu pénalisé par la TVA à hauteur de 8% alors qu'un consommateur qui perçoit 100 000 F. par mois ne consacre que 4,8% de ce revenu au paiement de la TVA. Autrement dit, l'impôt indirect taxe la consommation et non pas le revenu. Pas étonnant si la droite et l'extrême droite ont choisi cette voie-là.

## 0 - 6 % = ?

Ĉi-jare niaj laŭenspezaj impostoj malaltiĝos je 6%.

Sed tiu « donaco », kiu reprezentas 25 miliardojn da frankoj por la unua jaro, venas post plialtigoj 5AVI, karburajtoj, elprenoj el ŝparado, lokaj impostoj) kiuj ekde 1995 atingis 120 miliardojn da frankoj.

Sed duono de la saljatoj jam estas senimpostigitaj pro siaj nesufiĉoj vivrimedoj,  $0 - 6\% = 0$ . Kioman malpliigon ili profitos ? Denove, la plej senhavaj estos la trompitoj. Malfacilas kredi, ke la registaro ne pensis pri tio ...

Sed ĝi fanfaronas, ĉar li povis malaltiĝi la laŭenspezan imposton dank'al la redukto de l'publikaj elspezoj. Ĝuste en tiuj kondiĉoj onidire, nia « ekonomio plifortiĝas kaj kreas laborpostenojn (!) ». « La Ŝtato ne ekzistas por senlime kaj senkontrole elspezi la monon de la impostpagantoj, laŭ S-ro Chirac. Belaj vortoj por influi la kampulaĉon. Kiu ankoraŭ kredos tion ?

Sed sub tiu malaltiĝo kaŝiĝas tre precizaj kalkuloj. La laŭenspezaj impostoj, ĉiam malagrabla pagata, ja estas iom justa, ĉar ĝi estas progresiva, kion la nerekte imposto ne ebligas. Nu, laŭ S-ro J. Arthuis, ministro pri ekonomio, AVI iĝos « la imposto de la estonto en mondigita ekonomio ». Tio enigis drastan redukton de la publikaj elspezoj. Privatigoj kaj impostoj tiel iradas kune. Sed oni sciu, ke laŭ studo de la unuigita nacia sindikato de la impostoj (SNUI), la enspezo de smikulo <sup>(1)</sup> estas sankciita je 8%, dum konsumanto, kies monata enspezo atingas 100 000 F. pagas nur 4,8% de sia enspezo por AVI. Alidire, la nerekte imposto taksas la konsumadon, ne la enspezon. Ne miriga estas tio, ke la dekstraj kaj ekstremdekstraj partioj elektis tiun vojon.

<sup>(1)</sup> El « SMIC » minimuma oficiala salajro.

## La kancero de l'betono

Betono invadas urbojn kaj kamparon. Aŭtovojo, parkejoj, ĉielskrapantoj, baraĵoj aŭ atomenergiaj centraloj kreskas kiel fungoj. Ĉiam pli fortegaj, la novaj « altefikaj » betonoj eltenas kunpremojn kvar foje pli altaj ol la tradiciaj (200 megapaskaloj anstataŭ 50) kaj la betono ludas kun la gravito ekzemple la « Arkajo de l'Defendo », pariza templo de nia moderna epoko.

Bedaŭrinde, insidaj malsanoj danĝere minacas tiun « fortikulon ». Temas pri « alkala reakcio », « sulfata atako » aŭ plej simple « korodado de l'betono de monumentoj, baraĵoj aŭ pontoj endanĝerigante la sekurecon.

La unuaj simptomoj : fendetoj kaj flavetaj likajferoj montriĝis en Usono je la jaroj 40. En Francio, la unuajn malsanajn baraĵojn oni malkovris fine de la jaroj 70. Del jaroj poste oni konstatis ke pluraj pontoj ankaŭ estis koncernitaj. Preskaŭ ĉiaokaze la defektado de la konstruaĵoj estas kaŭzita de la feraj armaturoj enprizonigitaj en la cemento, kiuj rustiĝas pro elektrokemiaj reakcioj kaj displitigas la betonon.

De 3 jaroj Eŭropa Unio ekfunkciigis sciencan esplorprogramon (COST) por studi la korodajn fenomenojn en la betono. Multaj aliaj patologioj atakas la fortikecon de la konstruaĵoj el betono, kiel gelo kaj

degelo, kiuj plilarĝigas la porojn de l'betono kaŭzante fendetojn, ankaŭ sulfataj reakcioj kun la cementopasto entenante aluminatojn.

Dank'al novaj teknikoj oni povas hodiaŭ fabriki pli efikajn betonojn, lpi densaj ol kutime. Malgrandigante la betonajn porojn, la sciencistoj esperas duobligi la vivesperon de la konstruaĵoj, evitante multnombrajn neatenditaĵojn.

Tiu artikolo el « Science et Vie » n° 919 sciigas al ni unu el la grandaj solvontaj problemoj pri la moderna konstruado. Neatenditaj problemoj ankaŭ okazas en agro-kaj arbo-kulturoj, ankaŭ en preskaŭ ĉiuj industriaj fakoj. La eltrovo de l'cemento ebligis realigi ambiciajn konstruaĵojn : vertiĝodonajn ĉielskrapantojn, supermezurajn pontojn aŭ aŭdacaj submarajn tunelojn. Tamen la granda danĝero sin kaŝas en la betona naso mem, en kiu insida sed nepra korodado fatale detruas la lej rezistan ŝtalon. Oni povas imagi la eblajn katastrofojn, kiuj rezultus de tiu korodado : disfalo de konstruaĵegoj, rompiĝo de baraĵoj, ktp... Ofte post bedaŭrindaj kaj pikaj provoj pro nesciado kaj ĉefe trorkemo, la homoj devas lerni la plej elementajn lecionojn pri fiziko kaj kemio, ankaŭ aparte farigi pli singardemaj kaj saĝaj.

Robert ROZE.

### PIKNIKO EN LA PARKO DE SCEAUX (92 Hauts de Seine)

Kiel ĉiujare nun, niaj amikoj el Bondy, organizas piknikon por grupigi la esperantistojn de la pariza regiono. ankaŭ la neesperantistoj estos bonvenaj. Tio estas okazo vidi ke la esperantistoj estas homoj kiel la aliaj sed unu el iliaj idealoj estas paroligi la homojn el la tuta mondo inter si viŝante la lingvobarilojn per ESPERANTO. Ankaŭ estas la okazo informiĝi. Tri rendezuoj estas antaŭviditaj,

10h pour les piétons du RER

10h30 voitures, parking entrée du château

12h30 pour ceux qui ne veulent pas visiter: Grande Cascade pour le Pique Nique.

## Misuzo de « promocii » kaj « promocio » en Esperanto

Unu el la plej oftaj semantikaj stumbligiloj por franclingvaj parolantoj de Esperanto rilatas al la ĝusta uzo de la verbo « promocii » kaj la substantivo « promocio ». Ilustras tion la sekvaj tri citaĵoj ĉerpitaj el unu numero de LTE (n-ro 213, marto 1996)

1. « El la debato, du metodoj montriĝas : elekti librojn por promocii vendi aŭ oferti al eksterlandaj grupoj ... » (pĝ. 9)
2. « ... nia reputacio povas disvolviĝi, alporti kelkajn novajn partoprenantojn ĉe la kursoj kaj promocii la eblecojn por Esperanto » (pĝ.12).  
Rim. : la lasta frazo en la apudkolumna franca teksto estas : « ... faire connaître les possibilités de l'Espéranto. »
3. « [La staĝo] de Coquibus bone ekzemplas. Ni devas promocii ĝin ». (pĝ.13)  
Rim. : En la franca teksto la esprimo estas : « Nous devons en faire la promotion. »

Konsultado de francaj Esperanto-vortaroj indikas, ke estas malĝuste uzi « promocio » en Esperanto kun unu el la signifoj de la polisemia franca promotion, kiun la Esperanta vorto « promocio » ne havas. En Esperanto « promocio » signifas nur : rang(pli)altigo, graaltigo, oficaltigo (iun al). Same, la verbo promouvoir en la franca lingvo povas esti tradukita per « promocii » nur, kiam ĝi temas pri altigo de la statuso de iu persono. La sekvaj du citaĵoj montras la ĝustan uzon.

4. « Oni evidentigis, ke la studento ne estas prete preparita por la vivo. Oni devas fin-studi, ricevi promociion kaj diplomon opr sia ame elektita profesio » (LTE, n-ro 219, novembro 1996, pĝ.14).
5. « ...homoj, kiuj membras en la komunista partio, estas pli facile promociitaj ol la ordinaraj homoj » (LTE, n-ro 219, novembro 1996, pĝ. 10)

Ni nun ĝustigu frazojn 1, 2 kaj 3. En la unua, oni anstataŭigu « promocii vendi » per « reklame vendi ». En tiu ĉi senco la verbo promouvoir estu tradukita per « iniciati », « lanĉi », « akceli » aŭ « stimuli », ekzemple vendon. En la dua frazo la plej simpla solvo estas traduki la francan tekston laŭvorte : « konigi la eblecojn ». La signifo de la tria frazo estas : ni devas propagandi aŭ reklami la staĝon.

Ankoraŭ kelkaj citaĵoj donas ekzemplojn de la ĝusta lingvouzo.

6. « Tiu promocio ebligas mian eziĝon » (Plena Ilustrita Vortaro, pĝ.213 ĉ « ebligi »).
7. « En aŭgusto 1869, iom antaŭ la deka naskiĝdatreveno, laŭleĝa aĝo por tiu promocio, Lazaro eniris la reallernejon en Bjalistoko ». (Marjorie Boulton, Zamenhof : aŭtoro de Esperanto, pĝ. 23)
8. « En Jaroslavl residis ĉefepiskopo, kiu en 1907 promociis al patriarko ». (Ivan G. Ŝirjaev, Sen Titolo, pĝ.319). Rim. : La verboj devas esti « rezidis » kaj promociiĝis ».
9. « Mia kamarado ... dank'al sia kuraĝo kaj energio, gajnis al si la rangon de infanteria kapitano per siaj propraj meritoj kaj iris jam sur la vojo esti promociita kolonelo ». (Miguel de Cervantes, La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de La Mancha, pĝ.323).
10. « La Popola Registaro de Henan (Ĉinio) rajtigis uzi Esperanton kiel unu el la fremdaj lingvoj en ekzamenaj por promocii Henan-ajn funkciulojn al meza kaj supera titoloj » (Heroldo de Esperanto, n-ro 14, 1995, pĝ.2).
11. « Ili komencas pretendi pri balorajto kaj pri promociiĝo al administracia pozicio en urbodomoj » (Monato, septembro 1996, pĝ.11).

Bernard GOLDEN.

## PERFIDITA SOCIALISMO

La 17an de januaro aperis artikolo en la gazeto "Humanité" en kiu la hungara universitatano Victor Lugosi respondis al la demandoj de Emeric. Ollivier. El tiu konversacio mi atentis, nur pri unu punkto. Tio, kio sekvas, estas personaj pripensoj.

Al la demando: kiel vi klarigas la aktualan devojiĝon de la hungara sociala situacio? V. L. deklaras principe ke unue la elitoj sukcesis prepari sian liberalan konvertadon. Ili nur bezonis transformi la politikajn poziciojn kiujn ili havis ekonomie. Ili jam estis tute proksimaj de la eksterlanda kapitalo ĉefe de la germana kapitalo.

Mi imagas ke la rimarko pri la konvertado de la hungaraj elitoj povas esti etendita al ĉiuj iamaj socialistaj landoj. Efektive la laŭdira disfalo de la "komunistaj landoj" havas strangan bazon; ĝi estas la komuna maniero de la irado de "la komunistaj infero" al la "ultra liberala ĝojo"

Efektive kiamaniere ne miri pri la facileco kun kiu la reĝimo falis.

Sen elimini la kulpojn, la krimojn, la erarojn dum la komunistaj epoko ŝajnas ke, en multaj landoj regataj per la kapitalista sistemo, la demokratiaj kaj socialaj kondiĉoj estis kaj restas pli malbonaj. Sed tiuj kapitalistaj reĝimoj ne subite falis!

Oni povas dedukti ke la detruo de la socialista socio estis de longa tempe subfose de preparitaj eksteraj sed ankaŭ malfeliĉe de internaj premoj. Konsekvence kiamaniere konstrui veran socialismon dum la elitoj strabe rigardis al kapitalismo kaj samtempe al siaj propraj interesoj. Ŝajnas ke la sindikatoj kaj la komunistaj

partioj ne ludis la rolojn kiujn ili devus sekvi.

Mia pripenso povas esti taksata simpla sed, en la aktuala medio, koncerto nutrata de la "unika penso" estas bonmaniere mokdiri pri la socialismo, la komunismo kaj vidi la ruiniĝon de tiuj idealoj. Laŭ mia vidpunkto ne la komunistaj idealo perversigis la homojn sed kontraŭe certaj homoj tra siaj interpretadoj perversigis tiujn idealojn kaj reduktis ilin al limigitaj kaj administrataj vidmanieroj.

Tiuj elitoj ne estas pardoneblaj ĉar ilia propra intelekta friponeco puŝis milionojn da homoj al morala kaj socia mizero.

Koncerne min, mi konservas nedifektatan fratecon al ĉiuj tiuj manaj kaj intelektaj laboristoj kiuj, malgraŭ malfacilaj internaciaj kondiĉoj, sukcesis eltiri sian landon el maldisvolviĝo kaj alkonduki ĝin al moderna epoko. Sed kontraŭe mi havas nenian simpatian aŭ indulgon al tiuj karieristoj kiuj vendis sian popolon al Usona Dolaro aŭ al Germana Marko.

Ĉu ni estus pli bonŝancaj ol la hungaroj, ni, kiuj neniam forlasis la kapitalistan sinon?

"Nia lando estas vendata al eksterlandoj." deklaras Victor Lugosi.

Kaj ni? Efektive, ĉu lando povas ankoraŭ ekzisti en sia originaleco kiam ĝi ne plu posedas sian propran monon?



Petro Agostini.

## AŬSTRIO, ĜIA AKTUALA SITUACIO

.....mi provas doni al vi koncizan superrigardon pri la aktuala situacio de nia lando.

La plej tikla afero ĉe ni nun estas la demando pri la stato de nia neŭtraleco. la 15-an de majo de 1955 la tiama Aŭstra registaro interkonsentis kun la tiel nomataj aliancitaj ŝtatoj (Francio, Grand-britio, Rusio kaj Usono) ke Aŭstrio akceptos neŭtralan statuton laŭ la modelo de Svisio. La 26-an de oktobro de la sama jaro okazis la ratifo de la kontrakto kiu redonis al nia lando ĝian suverecon kaj sendependencon.

Dum jardekoj tiu neŭtrala politiko bone servis al la interesoj de nia popolo kiu povis vivi en paco sen timo je akuta konflikto kun siaj najbaroj. Laneŭtraleco ĝuis kaj ĝuas grandan estimon inter nia popolo. Sed ĝi estas granda obstaklo por la grandaj monopolkapitalistaj entreprenoj. Dum la ekzisto de Soveta Unio neniu kuraĝis tuŝi la aferon, sed kun la disrompiĝo de tiu grandpotenco la vento favoras por la monopolistoj.

Iliaj lakeoj, nomitaj politikistoj, obee devas detru la neŭtralan statuson de nia ŝtato, spite la kosciencon pri la estimo flanke de majoritato favore al ĝi. Pro tio paŝo post paŝo ili preparas la popolon helpe de adaptitaj amaskomunikiloj por ekkoni la arkaikecon de tiu restaĵo el pasinta tempo de malvarma milito kaj ke la plej favora por nia sekureco estus la membriĝo al la nordatlantika pakto. Kvankam jam dum jaroj oni malrespektis la konstitucion kaj permesis al la trupoj de tiu pakto moviĝojn inter niaj limoj (dum la golfa milito samkiel dum la balkana krizo). Al la lasta konflikto niaj politikistoj eĉ sendis "Helptrupojn" al Bosnio en kadro de IFOR, nomante ĝin humanisman intervenon.

La 12-an de junio de 1994 triumfis la kapitalo post intensega cerbolavado kaj mensogkampanjo kiam 69% de nia popolo voĉdonis favore al membriĝo al la komuna

merkato de Eŭropo, nun, du jarojn post la voĉdono kaj unu kaj duonjaron post plenumo de la aliĝo majoritato de nia popolo favoras al plej rapida eliro de tiu organizacio. Kiel ofte mi aŭdis la kritikon, ke mi estus postiĝinta kaj bremsulo de progreso, kiam mi levis mian avertan voĉon, kaj nun? Bedaŭrinde mi pravis, eĉ tro maltroigis, la sekvoj de tiu paŝo estas doloriga por plejparto de nia popolo. Spite la mensogojn de niaj politikistoj la salajroj malkreskis, la maldungo akiras dimensiojn de la kvindekaj jaroj. La socialaj instalaĵoj estas dekonstruataj, tra la nuntempe tro grandaj maŝoj de la sociala reto tro multaj falas en abismon, nur por plenumi la mastrihtajn direktivojn por la komuna Eŭropa monunuo EURO. Tion ne nur sentas nia popolo, sed ankaŭ la ceteraj Eŭropanoj. En kelkaj landoj jam okazis protestoj, kiel en Francio, en aliaj bedaŭrinde ne. Tiuj, kiuj ankoraŭ estas dungitaj, kiel mi, estas devigataj labori 50-horojn aŭ pli semajne kaj jam oni parolas pri regula sabata laboro. La maljunuloj devas labori pli longe por akiri la rajton je jubileo por poste ricevi pli malaltan emeritan monon. Kiam mi aŭdas la Eŭropajn politikistojn paroli pri rimedoj kontraŭ senlaboreco, mi sentas naŭzon kaj abomenon je tia perfido. Sendu la senlaborulojn al milito kaj vi ne plu devas nutri ilin. Ŝajnas esti la devizo.

Revenante al la temo de neŭtraleco mi devas aldoni, ke dum la antaŭelektaj kampanjoj en la komenco la politikistoj promesis, ke la neŭtraleco restos firma, ankaŭ en kazo de membriĝo oni ne tuŝas ĝiajn fundamentojn. Ni povos esti neŭtralaj en la merkato. Sed kiu konas la konstitucion de nia lando, kiu ja baziĝas sur la kontrakto de 1955, scias, ke tio tute ne eblus, ĉar la koncernaj artikoloj de tiu kontrakto ne estas permesate al nia ŝtato ligi sin kun militcelaj aŭ ekonomiaj Unioj, en kiuj ankaŭ membrus Germanio.

Post iom da tempo la terminologio de la politikaj lakeoj ŝanĝiĝis. Ni eniros

neŭtrale en la merkaton. Kompreneble, mi ankaŭ povas eniri seke en akvon. Niaj politikistoj surgenue pilgrimis al Bruselo por ke nia lando estu akceptata de la merkato. Same sendigne ili nun pilgrimas S-ro Clinton en Vaŝintono por ricevi postenon en NATO.

Konforme al la reguloj de libera merkato nia ŝtato vendis preskaŭ ĉiujn naciajn entreprenojn, kiuj nun troviĝas en

la ungoj de la ĉiopovaj monopoloj. Atendante tramon en Haltejo ĉe Danubo maljunulo diris al mi rigardante ŝipon de germana entrepreno, kiu pasintjare ankoraŭ navigis sub Aŭstria flago, tuto estas forvendita, tuto en germana mano, kiel en 1938....

Letero de Quietensky Ernst  
al NANBA Syozi  
el "LA VERDA KOLOMBO" N° 139

## LA KVINPETALO

PROGRAMO 1997

De la 1a ĝis la 4a (aŭ 6a) de Majo  
**Pied-migrado**

Gvidas: Ginette Gabillon, Monique Dusenty

De la 8a ĝis la 11a de Majo  
**Konstruo de sunhorloĝo!**

Gvidas: Patrick Lagrange

De la 17a ĝis la 20a de Majo  
**Tradukado. Preparado al skriba parto de la trigrada ekzameno**

Gvidas: Georges Lagrange

De la 8a ĝis la 12a de Julio  
**Praktikado de la Lingvo**

Gvidas: Dominique Baron

De la 15a ĝis la 19a de Julio  
**Praktikado de la lingvo (dua nivelo)**


Gvidas: Marie-Thérèse Lloancy  
Samtempe: **Iniciado al...gitaro**  
Prelegoj de Marjorie Boulton

La Kvinpetalo Esperanto-Kultur-Centro  
Fr 86410 BOURESSE  
33 05 49 42 80 74

## EKSTERLANDA PERKORESPONDA ESPERANTO KURSO.

Stéphane Dupin, JEFO-vivprezidinto de 1992 ĝis 1994, ĵus ŝtat-magistriĝis pri Esperanto en la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto, Hungario. Li estas la unua kaj ĝis nun sola Franco, kiu sekvis la 3-jaran perkorespondan Eo-kurson por eksterlandanoj starigitan en 1990. Nova 3-jara sesio okazos en septembro 1997. Interesatoj bonvolu skribi ekde nun al Esperanto Fakoj:

Universitato Eötvös Loránd  
Pf 107  
HU 1364 Budapeŝt Hungario



ESPERANTO  
PER POR  
LA  
MONDPACO



# Paĝo por la komencantoj

## MIA KATETO

En mia hejmo estas ore flava persa kateto. Ĝin ni rigardas ne kiel kateton, sed kiel knabeton, ne kiel besteton sed kiel hometon, kiel membron de la familio. Kiam ni eliras el la hejmo, ĝi sekvas nin



per la okuloj kaj ni diras al ĝi: "Ĝis revido!" Kiam ni revenas hejmen, ĝi tuj alkuras al ni kaj eĉ ĝoje grimpas sur nian korpon kaj ni ektenas ĝin en la manoj kaj diras al ĝi: "Saluton!" Kiam ni estas sendormaj dum nokto, ĝi akompanas nin kuŝante ĉe niaj piedoj. Kiam ĝi bone manĝas, ni tre ĝojas. Kiam ĝi ne volas manĝi, ni maltrankviliĝas. Kiam ni vidas ĝin, ni volas ekteni ĝin en la manoj. Kiam ni ne vidas ĝin, ni sopiras pri ĝi kaj tuj ĝin ekserĉas.

Iun-vesperon, antaŭ ol rigardi televidon, mi ne vidis la kateton kaj vokis ĝin dufoje, ĝi

tuj alkuregis al mi el la kuirejo kaj miaŭis al mi dufoje. Ŝajnis, ke ĝi diris al mi: "Ĉu vi vokas min? Mi kaptis muson en la kuirejo. Kion vi volas?" Post kiam mi rigardis televidon, mi ne vidis la kateton. Mi tuj ĝin ekserĉadis kaj trovis ke ĝi dormas, kuŝante arkoforme sur kesto, kun malantaŭa kruro ekster ĝia rando. Mi frapetis la kateton sur ĝia kruro. Ĝi tremetis kaj fiksrigardis min por momento. Ŝajnis, ke ĝi riproĉis min: "Mi dormas; Kial vi timigis min?"

La kateto kaptas por ni musojn. Ĝia vido estas akra kaj movo rapida. Ĝi neniam maltrafas sian celon. Ĝi tre ŝatas purecon. Ĝi neniam fekas kaj pisas kie ajn. Ĉiufoje, post kiam ĝi finmanĝas, ĝi tuj lekas sian buŝon per la lango kaj frotas la vizaĝon per antaŭa piedo lekita de la lango. Ĝi estas tre inteligenta. Ĝi scias, ke ni ĝin bone traktas. Ĝi neniam iras ekteren. Ĝi bone ludas kun ni. Ĝi alportas al ni ĝojon. Ni ĝin ŝatas kaj volonte servas al ĝi. Ĉiutage ni aĉetas kaj kuiras por ĝi kokajn kapojn kaj hepatojn, kiujn ĝi ŝatas. Mia edzino diris: "Ni ne malsatigu ĝin, eĉ se ni mem havus nenion por manĝi."

Unuvorte, ni ne povas vivi sen ĝi. Ĝi jam estas nedisigebla membro de nia familio.

De JI YINGENG  
el "EL POPOLA ĈINIO"

## KONTRAŬ PERSONAJ MINOJ.

Marie Claude BEAUDEAU vicprezidanto de la financa komisiono en la franca "Senato" sendis al ni leteron pri malarmado, eliminadoj de ĉiuj nukleaj armiloj kaj de kontraŭ-personaj minoj.

Pri la minoj en la oficiala ĵurnalo de la skribaj demandoj de la Senato:

"Sino M.C. Beaudreau atentigas la Ministron de la Defendo pri la ekzistado kaj la nocivo de la kontraŭ-personaj minoj kiuj jare murdas aŭ vundas 20.000 personojn inter kiuj estas multaj infanoj. Ŝi altiras lian atenton al la teruraj konsekvencoj sekve de la "ĝeneva akordiĝo" kiu legitimas la uzadon de minoj paraŝutigataj bombarde aŭ ĵetataj obuse. Ŝi demandas al li konatigi sian analizon pri tiuj gravaj kaj ŝokaj arangoj. Ŝi ankaŭ demandas al li ĉu li ne juĝas necese haltigi serĉadojn, kiuj daŭras por perfektigi tiun armilon, ĉiam integratan en la milita tragedio? Ŝi demandas kiajn antaŭrimedojn li prikonsideras por haltigi la serĉadon kaj produktadon de elementoj kiuj povas servi al minoj, kiel la eksplodiloj kiuj poste povas esti tutlegitime eksportataj."

Ni tute aprobas tiun demandon kaj dankas Sinon Beaudreau pro la sendo de tiu teksto.

## Ĉu vere ciumi ?

En la lasta n-rok-do Deker titolis « Kial forigi la ĉiuzon ? » - sed la enhavo montris, ke li pledas por ĝia uzado

Li argumentas, ke « ci » « estas termino por ameco, tenereco ». Unue mi diru, ke ĝi tute ne estas termino. Kaj precipe, ke ĝi spegulas la nacilingvan « tu », « du » ktp., kiu indikas familiarecon. Oni do tiel diras en la familio, inter parencoj (eĉ al iu, kiun oni tute ne ŝatas !), amikoj, junuloj, inter membroj de komunistaj kaj laboristaj partioj, cetaj sindikatoj ; plenkreskuloj tiel alparolas infanojn. « Ci » estas pronomo ne nur por amikaj aŭ amecaj rilatoj, sed ankaŭ por insultaj ! Tuj, kiuj forpelas hundon, faras tion ciumante. **La kontraŭeca signifo de « ci » malfavoras ĝian uzon.** Sed k-do Deker ne scias, kiel esprimi amecon kaj tenerecon sen ti siblanta kaj insulta partikulo « ci », mi konsilas al li esti malpli pigra kaj uzi pli klarajn vortojn por ami kaj karesi - ili ja abundas en nia lingvo kiel en aliaj (kaj precipe gestojn).

K-do Deker atribuas al « ci » precipe enhavan signifon (kvankam tre reduktitan), sed mi konas plurajn samideanojn, kiuj uzas ĝin strikte kiel singularan pronomon, ĉu ame aŭ male, ĉu karese aŭ insulte, kaj ili uzas « vi » samenhave, sed strikte plurale.

**Tiuj du uzeblecoj estas malsamaj kaj kontraŭas unu la alian.** Jam pro tiu konfuzo la pronomo « ci » (kiu ne ekzistas en la « Plena Gramatiko » de la Fundamento de Esperanto) ne havas multan ŝncon en Esperanto.

Estas pluraj kialoj por ne ciumi, pli kaj malpli gravaj. La plej grava estas, ke la

SE NI ĈIUJ STREĈOS  
NIAJN FORTOJN, ESPERANTO  
NEPRE VEA



pronomo « vi » havas dekomence ĝis hodiaŭ tute klaran difinon : Ĝi estas rekta alparolilo por unu kaj pluraj personoj, sendepende de la karaktero de la rilatoj inter la alparolanto kaj alparolato(j). « Vi » estas en la franca lingvo « tu » kaj « vous » samtempe, en la germana « du » kaj « Sie ». Dependas do de la enhavo de la frazo, de la situacio. La rilaton al persono oni do esprimu per rilatenhavaj vortoj. Se vi al iu diras « Donu al mi kison », vi ja ankaŭ ne disponas pri karesa pronomo, nek pri « ci », nek pri « vi ». Se vi volas, vi povas aldoni « karul(in)o », se ŝjnas al mi, ke la enhavo de la frazo mem jam esprimas la celatan ideon. Se vi diras « karul(in)o vi ! » brakumante alparolat(in)on, estas klare, ke « vi » uzatas en tenera senco.

Tiu, kiu sisteme uzas « ci » - ĉu en strikta singulara senco, ĉu en iu pli aŭ malpli klara enhava senco - ne nur enkondukas ion en la lingvon, sed ili samtempe grave atencas la ekzistantan lingvon Esperanto : ili ŝnĝas la enhavon de « vi », kiu por ili signifas nur formalan, ceremonian, ĝntilan rilaton. **Do por eviti gravan lingvoŝnĝon oni nepre ne ciumu !**

Anglalingvanoj ne havas problemojn tiukampe, sed la plejparto de la alilingvanoj ja ankaŭ ne. Ili estas plejparte feliĉaj senbalastiĝi je ofte peza decido, ĉu diri « tu » aŭ « vous ». Oni havas malofte tiom komfortan eblon forlasi nacilingvajn kutimojn. Kompreneble, K-do Deker, vi povas fari, kio ŝjnas al vi bona, sed mi avertas vin : Neniam alparolu min per « ci » - mi prenu tion kiel insulton.

Kamaraddece via.

Vilhelmo Lutermano

Ĉu Vi bone fartas ??



Kaj CI??

## Enmigradon kaj la leĝprojekto Debré

"Necesas kontraŭbatali kaŝitan enmigradon!" Interkonsento grandigas ĉirkaŭ tiu aserto, ekde kiam, dank'al la iniciatoj de la kulturaj medioj, la lukto kontraŭ la leĝprojekto de Debré ampleksiĝis. Ĉu la metodo de la ministro pri internaj aferoj estas la bona? Ne, ĉar ĝi konsideras nur la subpremado sen ne agnoskante la alportatajn riĉaĵojn de la enmigrado al Francio. Ĝi ankaŭ estas kondamninda pro sia volo kribi inter la bonaj kaj la malbonaj enmigrantoj, inter tiuj kiuj povas esti tolerataj kaj tiuj kiuj devas esti malakceptataj.

Sed kiuj estas tiuj famaj "malbonaj enmigrantoj"? Majoritate, ili venas de landoj kie ili malsatas per la sinsekvado de sklavaj komercistoj, devigataj labori kontraŭ panero, havante nur la rajton silenti kaj sinkaŝi.

La retoj estas konataj sed tre malmultaj estas malkonstruitaj, ankaŭ la ordondonantoj ne estas kondamnitaj.

Aliaj estis en regula situacio sed, okaze de kontrolo aŭ de renovigo de restadtitolo, retroviĝis, en la kadro de la leĝoj de Pasqua-Méhaignerie jetitaj en kaŝecon. Kiel la pli fruaj, la leĝo de Debré krom kelkaj normaligoj, aranĝas novan ondon de eksterleĝuloj.

Ĉu tiuj kaŝituloj estas tiel multaj, laŭdire, alportinte kun si, mallaborecon, malriĉecon kaj ekskluzivigon kaj kaptante la laboron de la francoj? Truditaj esti sendokumentuloj, ili estas nekalkuleblaj. Sed ni scias, cetere, ke la nedeklarata laboro, al kiu ili estas kondamnitaj por supervivi, rezultas de minoritato da eksterlandanoj sed de plimulto da francoj, tio relativigas la eventualan danĝeron.

La dungantaro kaj la politika povo pretekstas tiun danĝeron por deturni la atenton de la salajruloj pri la kaŭzo de iliaj malfacilaĵoj.

Nuntempe, la enmigrado, regula aŭ ne, ne estas problemo. Kontraŭe, la ekonomiaj kaj socialaj politikoj organizataj de post multaj jaroj havas dramajn konsekvencojn por la vivo de la salajruloj kaj de iliaj familioj. La kreskanta malsekureco ĉe certaj kvartaloj rezultas de tiu premeditita situacio kaj ne de la respondeco de iu aŭ alia kategorio. Krome ĝi ne rezultas de la kaŝita enmigrado kiu, pro la neceso sin kaŝi, ne estas deliktema.

La "debre leĝo" ne respondas al la zorgoj de la plimulto de la franca kaj enmigranta loĝantaro.

Kontraŭe ĝi limigos ĉies liberecon de ĉiuj. Ekzemple, la kontroloj de la veturiloj estos permesataj en dudekkilometra zono el la landlimo. Eĉ la polico povos eniri en entreprenojn pretekstante lukti kontraŭ la neleĝa laboro. Oni celas persekuti la eksterlandanojn en alia laborloko kaj krei suspektan etoson pri ili.

En la entreprenoj oni ne bezonas policistojn sed laborinspektorojn.

Ilia nombro kaj iliaj rimedoj devas kreski por persekuti la realajn fraŭdantojn.

La lukto kontraŭ tiun liberecmortigan projekton, eĉ se ĝi ampleksiĝis, restas ankoraŭ, inter salajruloj, temo kiu kolerigas ĉefe ĉe la laborloko. Sindikatoj, aktivuloj, sindikatanoj rezistas aŭ rifuzas ekstrakti la demandon, distribui flugfoliojn aŭ subskribigi peticiojn de C.G.T. Kelkfoje pro timo pri fortaj reagoj kaj pri pligravigo de dividoj, dum la batalo kontraŭ la neegalecoj necesigas mobilizon de ĉiuj salajruloj sen distingo pri iliaj devenoj. Ankaŭ esprimiĝas diverĝecoj kun la pozicioj de C.G.T. Sen perforteco, gravas ke ni povu debati, pri la konkretaj realecoj de la enmigrado, ĝiaj kaŭzoj kaj pri la solvoj por ke ĉiuj povu vivi kie li deziras. La maljustaĵoj, kiuj trafas la enmigrintajn

salajrulojn aŭ kiuj havas alian naturon ebligas postulan laboron por lukti kontraŭ la diskriminacioj. Sed trans la ĉiutaga sindikatlaboro, ni havas la respondecon disvolvi la solidarecon, la fratecon kaj la egalecon de la rajtoj, valoroj kiujn C.G.T. ĉiam portis. Trans la tuja lukto kontraŭ la

debrea leĝo, ni devas entrepreni daŭran laboron de debato kaj interŝanĝo de ideoj.

el l'HEBDO la VIE  
OUVRIERE "laborvivo" Marto 1997  
Semajna gazeto de franca sindikato  
C.G.T.

## ALVOKO DE ESPERANTISTOJ

Novaj subskribantoj

"Ni Esperantistoj, kulpas, ĉar ni ĵus gastigis- pro personaj aŭ profesiaj kialoj- eksterlandanojn. Ni ne denuncis niajn eksterlandajn geamikojn. Kaj ni plu gastigos, ne denuncos, simpatiiĝos kaj laboros sen kontroli dokumentojn de niaj samideanoj, kolegoj kaj amikoj.

Sekve de juĝo de la 4-a de Februaro 1997 kontraŭ S-ino Jacqueline Deltombe, "kulpinta" pro gastigado de neleĝa Zaira amiko- el la principo, laŭ kiu leĝo samas por ĉiuj- ni petas esti ankaŭ akuzataj kaj juĝataj.

Ni rifuzas, ke niaj liberecoj estu tiel limigitaj.

Niaj tradicioj kaj idealoj trudas nin konsideri ĉiujn homojn kiel fratojn de la sama gento: la Homaro.

Fine, ni alvokas niajn kuncivitanojn malobei kaj submetiĝi al malhumanaj leĝoj. Ni alvokas ĉiujn Esperantistojn solidari kun ni en tiu batalo por la homa digno."

\*se vi bonvolas subskribi tiun alvokon,  
retu al [esperant@worldnet.fr](mailto:esperant@worldnet.fr),  
faksu al 01 30 52 31 38,  
aŭ telefonu al 01 48 92 63 79.

Jam subskribis Pierre AGOSTINI, Michel AUDIBERT, René BALLAGUY, Claude BEAUJARD, Philippe BERRIZZI, Charles BILLARD, Julien BOESEL, Jean kaj Yvette BRETT, Vincent CHARLOT, Dominique COUTURIER, Philippe DIEUMEGARD, Alain FAGOT, Bruno FERRE, Gérard FLEUTER, Denis GAUCI, William GILBERT, Denise HAPPI-FOSSO, André kaj Denise HERVOUET, Joëlle HUET, Robert LAUDEREAU, Jacques LE PUJIL+4, Pierre LEVY, Vilhelmo LUTERMANO, Anne-Sophie MARKOV, Jean MARIN, Bruno MASALA, Gérard RÉQUIGNY, Jean RIPOCHE, Gérard ROLLIN, Tereza SABATIER, Rose SANZ, Robert kaj Danièle SCHLEY.

Apogis ekster Francio AVE (Manfred WESTENMAYER), ERA, UEA (Istvan ERTL), Herman DECEUNINCK, Acusxi HOSXIDA, Anne JOHNSON, Géza KURUCZ, Ron LYNN, Csaba NEMET, Eŭgeno PERVERTAJLO, James REZENDE PITON, Werther SACRAMENTO.

## ESPERANTO ĈE TELEVIDO

Vendredon, la 21an de februaro, mi havis surprizon malfermante mian televidon spekti lastajn bildojn de iu ludelsendo, kiam mi aŭskultis pri Eseranto.

Fakte, estis iu esperantisto Philippe, de JEFO (junuloj de UFE) kiun mi renkontas en la INSULEaj kunvenoj.

La elsendo konsistas el personoj kies metiojn aŭ apartaĵojn oni devas diveni. Unue, la publiko parigas metion kun iu partoprenanto. Poste ĉiu partoprenanto provas ludi la rolon kiun la publiko atribuis al li. Poste, je la fino, iu ludanto povas decidi kio estas ĉiu el la partoprenantoj. Finfine estas komparo kun la vero.

La ludantoj opiniis ke Philippe estas "Heraldikisto" (specialisto pri blazono) ĉar li bone ludis la rolon.

Poste li diris ke li estas specialisto pri ESPERANTO kaj eĉ li diris frazon en Esperanto, en la espero ke ĉiu el la partoprenantoj lernos Esperanton.

Ĉiuj okazoj estas bonaj por paroli pri nia internacia lingvo kaj multaj esperantistoj jam uzis tiun manieron tiucele. Bravo al Philippe pro tio.

*Tereza* El la bulteno de Verda Stelo 94 (Marto, Aprilo 1997)

## NUNTEMPA VIVO EN BULGARIO

Kelkaj aspektoj de la vivkondiĉoj en tiu lando:

- Monate la bulgaroj (kiam ili laboras?) ricevas po inter 2,3 kaj 10 dolarojn (1 dolaro = 3000 levoj) Oni kalkulas ke por februaro la nutraĵo necesas 62000 levojn,
- Unu kilogramo da fromaĝo kostas 5000 levojn, da rizo 1970, da terpomoj 800, da sukero 2200, da citronoj 2500 unu pano 500 (en marto 700 levojn!)
- Ĉiutage la prezoj duobligas. Hiperinflacio regas.
- Organizo de Unuiĝintaj Nacioj deklaras ke por vivi homo bezonas 4 dolarojn. Kiamaniere imagi la vivon de pensiuloj kiuj ricevas pension kiu egalas nur unu dolaron?

La bulgaroj akiris "liberecon" sed ili severe pagas tiun akiron! Kompreneble tiuj malfacilaĵoj profitas al tute minoritataj ekspluatistoj.

## ESPERANTO ET TELEVISION

Vendredi 21 février, j'ai eu la surprise, en allumant la télévision sur les dernières images d'une émission de jeu, d'entendre parler de l'Espéranto.

En effet, c'était Philippe de JEFO (jeunes d'UFE) que je rencontre dans les réunions d'INSULE.

L'émission consiste à faire deviner à des joueurs le métier ou la spécialité des participants. En premier, le public estime le métier de chacun des participants. Ensuite ces participants jouent le rôle qui leur est assigné. Enfin, un joueur prend la décision finale. Ensuite on compare avec la réalité.

Les joueurs avaient décidé que Philippe était hérauldite (spécialiste des blasons) car il sut jouer parfaitement ce rôle.

Ensuite, il indiqua qu'il était spécialiste de l'ESPERANTO et même put prononcer une phrase en Espéranto pour souhaiter que tous les participants étudient l'Espéranto.

Toutes les occasions sont bonnes pour parler notre langue internationale et beaucoup d'espérantistes ont déjà utilisé cette manière dans ce but. Bravo Philippe.

## La frontartikolo de la Prezidanto

Pri la Maastrichtkontrakto, la eŭropaj estraroj promesis liberan cirkuladon de la homoj. Jen estas! La Direktoro, Schweitzer, de la firmao Renault fariĝis de tio entuziasma propagandisto. Post la fermo de la fabriko de aŭtomobiloj Renault enplantigita en Belgio en Vilvorde li anoncis eblan reklasadon de belgaj salajruloj en francaj uzinoj. Ĝis revido familion. Bonan tagon tendumadveturilo

Jam la franca prezidento Ĵak Ŝirak invitis la junulojn forlasi sian landon por "serĉi fortunon" almenaŭ dungadon

La usona modelo, kun siaj grandaj migradoj de laboristoj kiuj forlas siajn urbojn kaj parton de siaj familioj por peti laboron en alia Ŝtato, laŭ la volo de la profito de multnaciaj entreprenoj, estas metita en la tagordon en Eŭropo. La enkonduko de unika mono cetere, pro ekonomiaj alĝutigoj, surpremus ĉefe la salajrulojn kaj konkurencigus ilin de unu lando al la alia.

Reage al la fermo de la uzino en Belgio laboristoj belgaj, francaj, hispanaj, organizadas fortajn manifestaciojn. Ekzemplodonaj estas tiuj translandaj luktoj. La laboristoj ne toleras esti manipulataj profite al minoritato de fortunuloj. La borsoj neniam estis tiel "prosperaj"

Oni kompreneble ne konsideru kiel solvon al la ekspluatado de la laboristoj kaj de multegaj homoj en Eŭropo kaj en la tuta mondo la iompostioma "uzado" de Esperanto. Ĝi faciligos la kontaktojn inter la ekspluatatoj. Kvankam tiu propono jam de longe ekzistas, ĝi tamen ankoraŭ valoras.

Robert Laudereau

## INSULE

La Insule(anoj) kunvenis la 11an de januaro en la sidejo de UFE en Parizo. Post la informa matena kunveno okazis la kunveno, posttagmeza pri pedagogio.

Jean Marin prezentis al ni apartaĵojn de la angla lingvo kaj eĉ de la vjetnama (kiu havas similaĵojn kun Esperanto). **La esperantistoj ĝenerale interesiĝas pri la strukturo de la diversaj lingvoj** kaj estas ĉiama okazo miri pri la logikeco de Esperanto kiu igas tiun lingvon la plej facile lernebla, eĉ se oni devas tamen labori por ĝin lerni.

Tiuj interŝanĝoj instigas partopreni la informojn pri lingvoj organizitaj de la junuloj de UFE. **Tiaj jam okazis pri la araba kaj la hungara.**

Philippe informis nin ke eblas sin inspiri de **ludo por paroligi dum la kursoj**, tio estas peti de iu la klarigon de iu vorto "sen aŭ devige" uzi vortojn aŭ esprimojn. La ĉeestantoj devas trovi la solvon (ekzemple: klarigi "domo" sen uzi "muro, fenestro, pordo, loĝi. Mi proponis ilustritan kartludon por labori pri la historio de Esperanto.

**La venonta kunveno okazos la 5an de Aprilo  
en Choisy le Roi, en la laborborso, parko Maurice Thorez.**

El la gazeto Verda stelo 94

ESPERANTISTA FEDERACIO DE LABORO

ĜENERALA KUNVENO

PROGRAMO

La Ĝenerala Kunveno de FET okazos en "le Tabou" en CASSIS (Bouches du Rhône)

**De Jaŭdo la 1a ĝis la 4a de Majo**

Akcepto de la partoprenantoj ekde la tagmezo de Merkredo

JĀŬDE:

Matene: Malkovro de "Le Tabou" kaj de la ĉirkaŭaĵoj

Posttagmeze: Partopreno al la **manifestacio de la 1a de Majo** en MARSEILLE.

VENDREDE:

**Ĝenerala Kunveno**

Tagordo

Morala Raporto

Financa Raporto

Rimarkoj pri aliĝo kaj abonoj

Laborista Esperantisto

La kursoj

Libroservo

La aktivaĵoj

Niaj rilatoj kun la Mondpaca

Esperantista Movado

Niaj rilatoj kun la aliaj Esperantistaj

Asocioj

Niaj engaĝiĝoj en la nuntempa lukto kontraŭ la difektado de la sociala situacio

Uzeblecoj de Internet kaj de la amasinformiloj

Proponoj kaj Diversaĵoj

Vespere

**FRATECA MANĜO**

SABATE:

Matene

Daŭrigo de la debatoj kaj elektado de la komitato

Posttagmeze

**Ŝipado ĉe " les Calanques "**

**Malkovro de la Regiono**

DIMANĈE:

Libera mateno


PREZOJ de la restado

Matenmanĝo	30 Frankoj
Tagmanĝo	60 F
Vespermanĝo	60 F.
Noktado	100 F.

Ekzemplo: Tuta restado de Merkredo vespere ĝis Dimanĉo tagmeze, 1000 F.

**Bonvolu anonci vian partoprenon al**

FET  
115 Rue Béranger  
92320 CHATILLON  
Tel+Kopio: 01 46 42 64 79



**CASSIS**

## EN NIA LIBRO-SERVO

### SENDKOSTOJ:

Por mendo malpli ol 400F.  
pago je ricevo de la fakturo  
(reala afranko entenata).  
Pli ol 400 F., afrankite.  
Eksterlande, 10%.

### PAGMANIERO :

Poŝtgiro, mandato aŭ banko-  
ĉeko je la nomo de F.E.T.  
CCP: 902-52 F - Paris

### SIN TURNI AL :

S-ro GAUCI  
12 rue J. Noize,  
F-93190 Livry-Gargan,  
☎ 16 01 43 88 03 57

## INTERVENOJ DE CLAUDE HAGEGE.

Okazis en Decembro forumo en Nantes pri la temo "Langues pour l'Europe"

Claude Hagège, kiel skribite en la komentoj de la elsendo de France Culture, unue rekomendas la studon de aliaj lingvoj ol al angla kiu devas esti "kontraŭiata". CH signalis ke en Usono la elitoj estas malfavoraj al la monda angla lingvo. Pro amikeco, al tiu elito, CH batalas kontraŭ tiun lingvon!

CH signalis ke en diversaj landoj en la mondo aperas lokalaj variantoj de la angla lingvo, ili ne plu estas kompreneblaj de la anglosaksoj.

Nia amiko Christian Rivière demandis al CH:

"Ĉu Esperanto, kiu funkcias, povus esti malpli malbona rimedo fronte al la angla lingvo?"

CH respondis:

"Mi dankas vin pro via mildeco. Kutime la esperantistoj estas pli agresemaj".

"La spirito de la plej grandpartaj esperantistaj kongresoj ne plu senrilatas kun la origina esperantista idealo... Tute apartaj eventoj al esperantismo estis la du mondaj militoj kiuj difektis la movadon. Alimaniere, esperantismo povus supervivi....Tiuj kiuj elektas paroli la anglan lingvon ekkunlaboras kun la usona potenco. Esperanto havus la avantaĝon aparteni al nenia potenco".

Eltiraĵoj de komentoj senditaj de Christian Rivière.

Christian Rivière esperantigis la libron: « LA MORTO NENIAM FORGESAS » de Didier Daeninckx

Vi povas aĉeti ĝin en nia libroservo 60 frankoj.


Le Fédération Espérantiste du Travail organise un cours par correspondance. Il se déroule en trois niveaux: 1er, 2ème et 3ème degré. L'inscription à chacun des niveaux comprend outre la correction des devoirs par un professeur spécialisé dans l'enseignement par correspondance, le service du journal de la F.E.T ("Le Travailleur Espérantiste") pour l'année civile ainsi que l'attribution d'un livre en Espéranto dès que vous avez terminé le niveau auquel vous êtes inscrit. Cette inscription est de 200 F. Tout renseignement complémentaire et inscription auprès du secrétariat de la F.E.T.:

115 rue Béranger,  
92320 - CHATILLON



# HISTORIO DE LA MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (M.E.M) 1953-1996

William Gilbert



Se pace, kiel saĝuloj, kunvivi ni ne lernos  
Ĉiuj, kiel frenezuloj kune ni pereos  
Martin Luther King

## Statuto de MEM

### Art. 5 :LANDAJ SEKCIOJ KAJ PERANTOJ

Landaj sekcioj agadas kiel reprezentantoj de MEM en siaj respektivaj landoj kaj observas la « bazajn principojn » kaj « specifajn celojn », konforme al la artikoloj 2 kaj 3 de la Statuto. Ili povas esti ankaŭ esperantistaj asocioj, kiuj, krom por siaj propraj celoj, agadas ankaŭ kiel reprezentantoj de MEM. Kreo de sendependaj MEM-sekcioj, ne agantaj por aliaj celoj estas tamen konsilata, por atingi pli vastajn popoltavolojn. Landaj perantoj estas unuopuloj kiuj reprezentas MEM en siaj respektivaj landoj, kiam ne ekzistas sekcio. Povas ekzisti ankaŭ organizoj kaj unuopuloj, kiuj agadas kiel perantoj de « Paco », sed ne reprezentas MEM en landoj, kie troviĝas nek sekcio, nek peranto de MEM.


Landaj sekcioj kaj perantoj kunlaboras kun la nacia pacmovado kaj eventuale kun aliaj pacorganizoj, kiel reprezentantoj de MEM kaj konforme al la artikoloj 1, 2 kaj 3 de la Statuto.

Ili informas la ĝeneralan sekretarion almenaŭ unufoje en jaro pri sia aktiveco, prezentas raporton por preparo de la ĝenerala Konferenco, klopodas sendi artikolojn kaj informojn al la ĝenerala sekretario por la bulteno « La Pacaktivulo » kaj al la ĉefredaktoro de « Paco ».

La prezidanto kaj sekretario de landa sekcio kaj la landa peranto de MEM estas plenrajtaj membroj de la Internacia Komitato tiel longe, kiel ili tenas sian postenon.

La landa peranto klopodas krei landan sekcion de MEM.

## STRUKTURO DE MEM



## Konkrete

**N**e sufiĉas sin deklari pacistoj. La vivo estas farita el konkretaj eventoj, kaj sian idealon oni devas defendi konkrete, por influi la iradon de la historio en pozitiva, humana, paca direkto. Tio evidente postulas komunan agadon de kiel eble plej multaj homoj, kiuj povas havi diversajn konceptojn pri politiko, religio aŭ kulturo, sed havas komunan idealon de paco, de socio humana kaj justa.

Tiu principo gvidas MEM ekde la komenco. Kiel esperantista asocio ĝi kunlaboras kun aliaj, neesperantistaj organizoj kaj asocioj por la al ĉiuj sama celo, anstataŭ resti kiel ia sekto en sia angulo sen iu ajn serioza perspektivo. Se kreskas la prestiĝo de Esperanto en progresistaj rondoj, tion oni ŝuldas grandparte al MEM.

Necesas citi almenaŭ kelkajn el la eventoj, pri kiuj nia movado agadas. Ni ekzemple estas inter la unuaj, kiuj kondamnis la francan koloniismon tiel en Alĝerio kiel en Vjetnamio, kaj la abomenan usonan agreson kontraŭ tiu lasta lando. Ĉiu popolo rajtas ĝui nacian sendependon sen iu ajn ekstera interveno. Sed la helpo de la vjetnamaj taĉmentoj al Kamboĝo fakte savis tiun landon el totala neniigo fare de la ruĝaj ĥmeroj, armitaj de aliaj landoj, kaj sekve ankaŭ ĝian suverenecon. Multaj altranguloj kaj ĵurnalistoj (nur) nuntempe « malkovras » Nelson Mandela. Ni ne atendis tiel longe por postuli lian liberigon kaj ĉesigon de la rasapartigo en Sudafriko. Ni senĉese subtenas la klopodojn faratajn por justa paco en Mezoriento, kio signifas i.a. la agnoskon de palestina ŝtato sendependa en la limoj fiksitaj de U.N., la defendon de la kurda popolo k.t.p. ...

Oni povus citi multajn aliajn eventojn tra la mondo, kiuj vekis maltrankvilon kaj kaŭzis nemezureblajn dramojn, kaj postulis reagon de la pacistaj fortoj. Ankoraŭ nuntempe ni travivas barbarajn eventojn fare de iuj sangosoifaj fanatikuloj, sed ankaŭ de iuj ŝtatoj. Ni kompreneble devas

kondamni la kriman etnan diskriminacion en la eksa Jugoslavio, la malbravan agreson de la rusa ŝtato kontraŭ Ĉeĉenio, la abomenajn krimojn de la integristoj en Alĝerio, k.t.p. ...

La mondo ankoraŭ ne saĝiĝis kaj restas danĝera. Ni konstante subtenis, -as, -os la klopodojn por ĉesigo de la vetarmado, malpermeso de nukleaj testoj, totala malapero de amasdetruaj armiloj, k.t.p. ... UN kaj la Sekurkonsilio devas esti demokratigitaj tiel, ke ili ne plu obeu nur al la superpotencoj...

Ĉi-sube oni trovos liston de la ĉefaj porpacaj kongresoj kaj konferencoj en kiuj MEM partoprenas.

- 1955 : Monda Packongreso en Helsinki (2 000 delegitoj el 90 landoj). Ĉeestas Knut HAGSTROM (Finlando) kiel oficiala delegito de MEM kaj esperantistoj el Bulgario, Japanio, Svedio kaj Finlando.
- 1957 : Festivalo de junularo por paco kaj amikeco, en Moskvo. Ĉeestas Tinka LAKOVA, konata MEM-veteranino.
- 1958 : Du delegitinoj de la Schweitzer-komitato intervenas en la Konferenco de la Tri Granduloj en Ĝenevo. En la preparo de tiu interveno esperantistoj - inter ili MEM-anoj - ludis gravan rolon.
- 1963 : Kunsido de la Monda Packonsilio (MPK) en Varsovio, en kiu estas invitita reprezentanto de MEM. Rezolucio de la kvara komisiono agnoskas la utilecon de Esperanto kaj deziras, ke MEM kunlaboru pli aktive kun MPK.
- 1969 : Monda Porpaca Asembleo en Berlino : 1 102 delegitoj el 56 internaciaj organizoj, 320 naciaj organizoj el 101 landoj, ok reprezentantoj de MEM, nome : Nikola ALEKSIEV (Bulgario), Tomas BALDA (Ĉeĥoslovakio), Antón BALAGUE (Aŭstrio), William GILBERT (Francio), Rudi GRAETZ

(Germana Demokratia Respubliko), Konstantin GUSEV (USSR), Lech KOSIENIAK (Pollando), D-ro Lajos MARTON (Hungario). Niaj delegitoj parolas en kvin komisionoj. La prezidanto de MEM ĉeestas la prezidejon kaj parolas en la solena ferma kunsido.

- 1971 : Asembleo de MPK en Budapeŝto, kun 800 delegitoj el 124 landoj kaj 33 internaciaj organizoj, inkluzive de MEM. La prezidanto de MEM tiam estas elektita membro de MPK.
- 1973 : Monda Kongreso de l'Pacamaj Fortoj en Moskvo. Subskribo de interkonsento inter MPK kaj MEM. Partoprenas trimembra oficiala delegitaro de MEM (Nikola ALEKSIEV, prezidanto de MEM, William GILBERT, centra redaktoro de PACO, Semjon PODKAMINER, sekretario de l'Sovetia MEM-sekcio), Dim BJELANOVIC, peranto de MEM en Jugoslavio k.a.
- 1975 : Internacia Virina Kongreso en Berlino, kun 2 000 delegitinoj el 130 landoj. Partoprenas du delegitinoj de MEM (Ingrid SCHÖDL kaj Hella SANERBRAY).
- 1977 : Kunveno de la Internacia Komitato de la organizo « Eŭropaj Sekuro kaj Kunlaboro » en Bruselo. Partoprenas MPK kaj dek aliaj gravaj organizoj inter ili MEM (Claude GLADY). Monda Asembleo de Packonstruantoj en Varsovio : 1 500 delegitoj el 125 landoj kaj 50 internaciaj organizoj, inkluzive de MEM. Eksterordinara konferenco de MPK en Berlino. Partoprenas la prezidanto de MEM
- 1979 : Solidareca konferenco de MPK en Helsinki, kie alparolas esperantilingve la prezidanto de MEM.
- 1980 : Estrara kunveno de MPK en Budapeŝto, kies alvoko aperas ankaŭ en Esperanto. Estas tie distribuataj propagandfolioj pri MEM en lingvoj angla, franca kaj germana. Mondparlamento de la Popoloj por la Paco, en Sofio, kun 2 260 delegitoj el

134 landoj, inkluzive de kvin delegitoj de MEM (N. ALEKSIEV (Bulgario), William GILBERT (Francio), Dimitar HAĜIEV (Bulgario), V. OLJANOV (Bulgario), D-ro Imre PETHES (Hungario)). Paralele okazas MEM-kunveno en kiu partoprenas kelkaj estraranoj de MPK.

- 1982 : Monda Kongreso de Virinoj, en Prago. Partoprenas unu oficiala delegitino de MEM. Preparkunveno por Monda Asembleo por Paco kaj Vivo, kontraŭ la nuklea milito, en Lisbono, organizita de MPK, kun 300 personoj el 90 landoj. Partoprenas reprezentanto de MEM (J.S.DINIS el Portugalio). Monda Asembleo por Paco kaj Vivo kontraŭ Nuklea Milito, en Prago (3 625 delegitoj el 132 landoj : 20% el la socialismaj landoj, 40% el kapitalismaj kaj 40% el evolulandoj). Partoprenas ok esperantistoj, nome : D-ro Imre PETHES (Hungario), Milada HEMERKOVA (Ĉeĥoslovakio), Drahomir KOČVARA (Ĉeĥoslovakio), Clément THOLET (Belgio), Margit TURKOVA (Ĉeĥoslovakio) por MEM, Z. KRIMSKY (sekretario de ĉeĥoslovaka esperanto Asocio), D-ro JERMAR (prezidanto de ĈEA), Vl. KOČVARA (vicprezidanto de ĈEA), Jozic COPLAND kaj Richard HOWARD (Britio), prof René DEPRESZ (Belgio).
- 1986 : Sesio de MPK en Sofio. Partoprenas delegitoj el la tuta mondo. Inter ili MEM estas reprezentata de N. ALEKSIEV, D-ro Imre PETHES kaj Vasja CVETKOVA (ĉi-lasto el Bulgario).

Evidentas, ke la ĉi-supraj okazintaĵoj ne rezultas nur el la agado de kelkaj « altranguloj ». Ĉiun atingiĝon, ĉiun progresadon oni ankaŭ ŝuldas al la abonantoj de « PACO », kiuj finance subtenas la movadon, kaj al la aktivuloj de la bazo ĝis la supro, kies agado estas multflanka.

En diversaj landoj, en multaj urboj troviĝas esperantistoj, MEM-anoj, kiuj partoprenas

en la laboro de la packomitatoj aŭ de aliaj organizoj pacdefendantaj. Oni trovas ilin en nemalmultaj manifestacioj kaj kongresoj. En Pardubice (Ĉeĥoslovakio) ekzemple, ili organizas jaran renkonton, en kiu troviĝas centoj da neesperantistoj kaj esperantistoj, kaj reprezentantoj de la oficialaj instancoj. Ili kontaktas organizojn

el diversaj landoj per Esperanto faras tradukojn, ekspoziciojn k.t.p. ... Ili sendas artikolojn kaj raportojn al la MEM-gazetoj, kaj klopodas disvastigi la centran organon, PACO, aŭ partoprenas en eldonado de sia propra landa N° de PACO. Iuj ricevas oficialan dekoracion pro sia porpaca aktivado.

### La etapoj

(Alidire : la ĝeneralaj konferencoj de MEM)

Ili okazas principe ĉiun trian jaron, sed la eventoj aŭ praktikaj problemoj kelkfoje iom modifis tiun periodecon. Krome, la nombro da partoprenantoj tre varias de unu jaro al alia. Plej ofte la Ĝenerala Konferenco (ĜK) okazas paralele kun la Universala Kongreso de Esperanto (UK), kio ebligas partoprenon de pacamikoj, kiuj ne povus fari du longajn vojaĝojn en la sama jaro. Sed kiam ĜK okazas en t.n. socialisma lando, la nombro da ĉeestantoj estas pli granda, ĉar tie MEM estas forte subtenata de la esperantistaro. Male, la sukceso de ĜK estas malpli grava kiam ĝi okazas en okcidenta lando, pro la manko da intereso okcidente kaj neeblo vojaĝi « okcidenten » por granda nombro da « orientaj » samideanoj.

Ne eblas ĉi-tie fari detalan raporton pri ĉiu ĜK, pro timo tedi la legantojn. Maldetale, ĜK-oj diskutas pri la pli malpli sukcesa realigo de la MEM manifesto, loke, nacie kaj je la nivelo de la MEM-estraro, pri la rilatoj kun neesperantistaj pacorganizoj kaj aparte MPK (Monda Packonsilio), pri nia propra aktivado koncerne la defendon de la paco, pri niaj rilatoj kun aliaj esperantistaj asocioj i.a. UEA kaj SAT. La ĜK-oj aprobas diversajn rezoluciojn pri la agado de MEM kaj pri aktualaj pacproblemoj, alvokoj al ŝtatestroj k.t.p. ... Krome ĝi elektas internacian komitaton laŭ proponoj de la landaj sekcioj, kaj tiu komitato elektas la estraron por la periodo ĝis la sekvonta ĜK.

#### La unua ĜK

Temas fakte pri la unua renkonto en St Pölten (Vd ĉapitron « La Naskiĝo »).

#### La dua ĜK

Ĝi okazas en 1959 en Varsovio, paralele kun la 44a UK de Esperanto. Partoprenas 250 MEM-anoj. Inter ili estas delegitoj el Vjetnamio kaj Indonezio. Konstateblas, ke

MEM estas disvastiĝinta en 40 landoj, kaj 16 el ili jam regule eldonas siavice la revuon PACO. En Bulgario kaj Vjetnamio la movado ŝturme progresadas.

#### La tria ĜK

Ĝi okazas en 1963, en Sofio paralele kun la 48a UK de Esperanto. Ĉeestas pli ol 500 personoj. Konfirmiĝas la progresado, sed ankaŭ la prestiĝo de MEM. Por la unua fojo venis sovetia delegitaro. Komenciĝas nova periodo de laboro en pli bonaj internaciaj cirkonstancoj, post la subskribo de la kontrakto inter Usono, Britio kaj USSR, kaj telegramo estas sendita al S-roj Ĥruŝĉov, Kennedy kaj Mac Millan.

Koncerne « PACO », la eldonkvanto nun atingas 2 400 ekzemplerojn.

Fine, la ĜK post diskutado, adoptas la projekton de statuto (Vd apartan ĉapitron : « La statuto de MEM »).

#### La kvara ĜK

Ĝi okazas en 1966, en Budapeŝto, paralele kun la 51a UK. En plenplena salono amasiĝas 400 personoj. Reprezentantoj de gravaj neesperantistaj pacorganizoj salutas la konferencon. Salutleteroj venis el La Kristana Esperantista Ligo, la Japana Komitato kontraŭ Atoma kaj Hidrogena Bombo, la Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio k.t.p. ...

S-ino Kato Kumi el Japanio transdonas grandan verdan standardon kun sloganoj subtene al la heroa batalo de l'vjetnama popolo kontraŭ la usona agreso. La standardon ricevas, kiel simbolon de solidareco, la Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio.